

Protokolo de la konstituiga kunveno de la senato de AIS por la periodo 2008–2011, okazinta en la ŝtata muzeo (*Museo di Stato*) de San-Marino (SM).

Kunsidtempo: Sabato, 2007-09-08, 16:30–17:15. Ĉeestas ĉiuj kvin elektitaj senatanoj (profesoroj Fössmeier, Minnaja, Pennacchietti, Quednau, Wickström).

La nova senato sen kontrauvoĉoj elektas OProf. Pennacchietti prezidanto kaj OProf. Minnaja vicprezidanto.

La senato unuanime decidas, ke la ĝisnuna prezidanto, OProf. Dr. habil. Helmar Frank, estu honora prezidanto de AIS.

La senato unuanime decidas, ke la kvar ĝisnunaj senatanoj konservu la direktorecojn de siaj oficoj. La elekto de vicdirektoroj kaj de la ekzamenofico estas prokrastata pro tempomanko.

San-Marino, 2007-09-08

C. Minnaja, kunsidestro

R. Fössmeier, protokolanto